CONDORCET A.C. : *Esquisse d'un tableau historique des progrès de l'esprit humain* (Skizo de historia tabulo de la progresoj de homa sprito). *Introduction et notes par Monique et Francois Hincker, Paris 1966*
COTEANU *Ion : Stilistica functionala a limbii romane* (La funkcia stilistiko de la rumana lingvo). *Vol.I, Bucuresti, 1975; Vol.II Bucuresti 1985*
CROCE *Benedetto : Esthétique comme science de l'expression et linguisque générale* (Estetiko kiel scienco de la esprimo kaj ĝenerala lingvistiko). *Traduit sur la 10-ième édition italienne par Henry Bigot, Paris 1904*
DENSUSIANU *Ovid : Evolutia estetica a limbii romane* (La estetika evoluo de la rumana lingvo). *Curs litografiat, Bucuresti 1929-1930*
DIMA *Al. : Dezbateri critice* (Debatoj pri literatura kritiko), *Bucuresti 1977*
DUFRENNE *Mikel : Phénoménologie de l'éxpérience esthétique* (Fenomenologio de la estetika sperto). *Paris 1953*
*Horatius* (65-8 a.K.) *Ars poetica* (Poetika arto)
HRAPCENKO *M. : O progresse v literature i iskusstve* (Pri la progreso en la literaturo kaj arto). En: *"Voprosí literaturí" nr. 5, 1970*
HUIZINGA *Johan : Homo ludens* (La ludanta homo). Traduko el la holanda lingvo *(H.R.Radian), Bucuresti 1977*
KANT *Immanuel : Kritik der Urteilskraft* (Kritiko de la juĝkapablo), *Berlin,* 1790
MARINO *Adrian : Dictionar de idei literare* (Vortaro de literaturaj ideoj). *Vol. I, Bucuresti, 1973*
VIANU *Tudor : Introducere in teoria valorilor* (Enkonduko en valorteorio). *Bucuresti 1972*
*Idem : Estetica* (La estetiko). *Bucuresti 1939*

Adreso de la aŭtoro:
*Prof. Ignat F. BOCIORT*
*Bd. Eroilor nr. 7/D*
*RO - 1900 Timişoara*
Rumanio

Priaŭtora informo

La aŭtoro studis filozofion kaj filologion en la Universitato de Bucuresti, doktoriĝis pri filozofio en la Universitato *Humboldt,* Berlin, estis asistento kaj lektoro en la Universitato de Bucuresti, docento kaj profesoro en la Universitato de Timişoara. Ekde 1990, kiel pensiulo, li estras la Tutlandan Universitatan Esperanto-Centron, funkciantan en Timişoara.



RECENZO

Nikola Rašič

**La rondo familia**

**Sociologiaj esploroj en Esperantio**

Edistudio, Pisa (IT), 1996
ISBN 88-7036-062-8 (192 p., 27.- NLG)

Estas konata fakto, ke multaj faktoroj de uzado kaj evoluado de lingvo klarigeblas nur surbaze de solidaj konoj pri la komunumo de tiu lingvo. Tio precipe validas por la planlingvo Esperanto, ĉar la ekzisto de sufiĉe granda kolektivo kiel 'lingvoportanto' estis kaj estas la ĉefa antaŭkondiĉo, ke Esperanto (diference de la multaj aliaj projektoj) kapablis fariĝi plenfunkcianta komunikilo. Sociologiaj esploroj pri Esperanto pro tio estas esenca kaj necesa parto de esperantologio. Ĉar tiu kampo ĝis nun estas malbone plugita, la malmultaj studaĵoj ekzistantaj apenaŭ konataj, la libro de la kroata sociologo Nikola Raŝiĉ precipe bonvenas.

La aŭtoro en la unua parto donas superrigardon pri la ĝisnunaj esploroj. Li kompare prezentas entute dek studaĵojn (la unua okazis en 1926/27, la plej freŝdata en 1992; la plejmultaj celas al naciaj Esperanto-movadoj). Raŝiĉ dividas ilin en du grupojn: estas unue simplaj statistikaj esploroj el Nederlando, GDR, Bulgario, Finnlando kaj tiu de UEA el 1991; due ekzistas esploroj "kun analizaj ambicioj", kiel Raŝiĉ pritaksas. Inter tiuj la plej ampleksaj verŝajne estas la konata de Peter Forster pri la socia strukturo kaj la valoraro de membroj de Brita Esperanto-Asocio kaj la aktuala de Frank Stocker, kiu faris enketon pri la membroj de Germana Esperanto-Asocio. La rezultoj de ambaŭ esploroj estis memstare publikigitaj (Forster 1982; Stocker 1996). Mia ĉefa intereso pro tio rilatas la duan parton de la libro, en kiu la aŭtoro prezentas sian propran enketon el la jaro 1985.

Temas pri la internacia esploro "konsistigaj elementoj de la Esperanto-kulturo". La titolo jam indikas la postuleman celon de la aŭtoro. Lia enketilo estis tre ampleksa (entute 143 kriterioj) kaj inkluzivis demandojn ne nur pri la demografia strukturo, komunikaj bezonoj kaj kutimoj de la enketitaj, sed ankaŭ pri

politikaj, religiaj kaj kulturaj sintenoj, pri idealoj kaj movadaj aferoj. La origina plano havi du paralelajn samplojn - unu konsistantan nur el esperantistoj kaj alian el grupo de ne-esperantistoj - pro manko de resenditaj enketiloj bedaŭrinde ne realiĝis. Pro la malalta nombro de partoprenantoj Raŝiĉ modeste pritaksas siajn rezultoj ne kiel reprezentivajn statistikojn, sed nur kiel "iom orientigajn informojn" (p.100). Tamen ili (precipe en kombino kun tiuj el antaŭe menciitaj esploroj) valoras donante informojn pri esencaj ecoj de la Esperanto-komunumo.

La enketo unue konfirmas rezultojn el pli fruaj esploroj rilate sekson, aĝon, eduknivelon kaj lingvokonojn: du trionoj de la enketitaj personoj estas viroj; la plejmulto estas soluloj; ili lernas Esperanton aŭ tre junaj aŭ en la t. n. tria aĝo; Esperanto-parolantoj estas pli alte edukitaj ol la averaĝa loĝantaro kaj plurlingvaj. Rilate politikajn orientiĝojn kaj idealojn malfacilas ĝeneraligi. La aŭtoro trovas, ke pli ol 80% ne estas membroj de ajna partio kaj tiuj kiuj interesiĝas pri politiko subtenas ĉefe maldekstrismajn ideojn. Stocker en sia studaĵo pri Germanio konstatas, ke esperantistoj pli intense ol la averaĝa loĝantaro pledas por sociaj valoroj kiel ekz. politika kundecidado, solidareco, egalrajteco de virinoj, socia justeco, toleremo. La rezultoj rilate la demandoj pri idoloj, idealoj kaj opinioj pri internaciaj rilatoj al la analizo de Raŝiĉ montras kiel esencajn trajtojn de la esperantistoj la batalon por justeco sen uzo de perforto kaj la idealon de paco: pinte de la nomitaj plej estimindaj politikistoj kaj publikaj agantoj de la moderna epoko (p.130) staras Martin Luther King kaj Mahatma Gandhi; ĉefa ostaklo al pli bona internacia interkompreniĝo por granda parto de la parolantoj estas, kiel oni supozis, lingvaj baroj (33,33%) - la unuan lokon tamen okupas la danĝero de milito kaj de memdetruo per atomarmiloj (37,18%) (p.124).

Precipe interesaj mi trovis la rezultojn pri la sinteno al Esperanto, la lingvo kaj la movado. Raŝiĉ liveras multegajn donitaĵojn pri lingvoscioj, membreco en organizoj, vojaĝoj, abono de revuoj, pri verkado, tradukado kaj korespondado, sed ankaŭ pri opinioj rilate al la lingva normo. La analizo konfirmas la ofte priplenditan sintenon de esperantistoj al sia literaturo: nur kvinonon oni povas konsideri regulaj legantoj de Esperanto-literaturo (p.159). Precipe instruaj estas la rezultoj pri movadaj celoj (p.175): 80,13% opinias, ke helplingvo estas bona solvo de la monda lingvoproblemo, sed al la demando pri la realaj eblecoj de internaciskala uzado de Esperanto (p.176) nur 23,02% respondas, ke "tio povus okazi baldaŭ", 19,87% sin decidas por la pritakso, ke "la homaro ankoraŭ ne estas matura por tio", 24,36% konstatas, ke ili "ŝatus ke tio iam okazu, sed dubas ke tio realiĝos". Atentindas laŭ la aŭtoro relative granda grupo de homoj (ĉ. 9%), kiuj opinias, ke "tio ne estas necesa, al ni en la movado ĝi bone servas". El tio la sociologo Raŝiĉ konkludas: "Tio egalas al procezo de socia transformiĝo el reformisma movado en alternativan kulturon, mikrosocion paralelan al la makrosocio, aŭ eĉ komplementan rilate al ĝi, kaj esence memsufiĉan." (p.176) Tiun pritakson pri la komunumo kiel pli-malpli "fermita socio" subtenas ankaŭ la donitaĵoj pri la rilato inter Esperanto kaj familio kaj la rolo de la Esperanto-literaturo. Konforme al aliaj enketoj (ekz. tiu de Forster) La aŭtoro trovas, ke ĉe ĉirkaŭ du trionoj de esperantistoj ankaŭ la vivkunuloj parolas la lingvon; rilate al la funkcio de la Esperanto-literaturo ĉ. 65% pensas, ke "la literaturo estas grava por la interna forto de la movado".



La sociologaj studaĵoj en Esperantio, kiujn Raŝiĉ prezentas en sia libro, estu rigardataj komencoj de metodologie fondita socialogia esplorado. Malgraŭ kelkaj malperfektaĵoj (rilate al Forster tio koncernas la aktualecon: lia libro el 1982 priskribas enketon el la jaro 1968; ĉe Stocker [1996] konsiderendas, ke la samploj "esperantistaro" kaj "averaĝa loĝantaro" kiel kontrolgrupo pro diferencaj karakterizaĵoj estas nur parte kompareblaj; rilate al la enketo de la aŭtoro grava malavantaĝo estas la malgranda nombro de partoprenantoj: malpli ol 170) en sia tuteco ili prezentas riĉegan fonton, kiu helpas al ni kompreni aktualajn evoluojn en Esperantio. La libro estas grava empiria bazo por la laboro de esperantologoj, ĝi estas ne malpli interesa por ĉiu Esperanto-parolanto, kiu volas ekscii ion pri sia komunumo.

Sabine Fiedler